

Salutvorto de la redaktoro

KARA LEGANTO

Estas ĝojo prezenti al vi la kvaran kajeron de *Esperantologio*! Ĝi enhavas kvin originalajn studojn kaj unu recenzon. El la kvin studoj kvar estas en esperanto kaj unu en la angla; la recenzo estas en esperanto.

★

Surbaze de sia ampleksa sperto en la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro de la Akademio de Esperanto Bertilo Wennergren montras al ni siajn principojn por elekto de bazformoj en vortaroj, kio ja estas grava leksikologia problemo.

Andreas Künzli verkis enciklopedion pri planlingvoj, precipe pri la aktiveco en Svislando. Gonçalo Neves recenzas tiun ĉi monumentan verkon.

La vortordo subjekto-verbo-objekto (SVO) estas pli ofta en esperanto ol la kvin aliaj permutaĵoj (OSV, OVS, SOV, VOS, VSO). Ĝia ofte estas ĉirkaŭ 90%. En nova studo Christian U. Krägeloh tion konfirmas kaj malkovras malgrandan sed signifikan diferencon inter verkantoj kun slava lingva fono kaj tiuj kun latinida lingva fono.

Natalia Dankova prezentas al ni empirian studon pri verbaj formoj en esperanto parolata de personoj havantaj la francan, italan kaj rusan kiel denaskan lingvon. Ŝi studas ankaŭ la uzon de verbaj formoj fare de Zamenhof.

Árpád Rátkai detale studas la falsaĵojn kiujn oni dum jarcento disvastigis pri la nomo, plumnomoj, naskiĝloko kaj aliaj datumoj rilatantaj al Zamenhof kaj komparas ilin kun faktoj.

Fine Petr Chrdle rakontas pri nova Esperanto-Muzeo en Svitavy, Ĉeĥio, kiu estis inaŭgurita en 2008.

★

En la unua kajero de *Esperantologio / Esperanto Studies* mi citis artikolon de Eugen Wüster el 1955, laŭ kiu la unuan fojon uzis li la terminon *esperantologio* (en 1921). Detlev Blanke atentigas ke jam dek jarojn pli frue, en 1911, OSSAKA Kenji (1888–1969) publikigis artikolon kun la titolo “Esperantologio” en la revuo *Oriente Stelo*, organo de Jokosuka Esperantista Societo (citite laŭ Kawaski 1978). Vidu Blanke (2006:167).

★

Pri la aperiga politiko de la revuo bonvolu legi en la *Notico de la redaktoro* en kajero 1.

La revuo estas ia daŭrigo de la revuo *Esperantologio*, kiun Paul Neergaard (1907–1987) redaktis kaj eldonis dum la jaroj 1949–1961. Aperis ses

kajeroj ampleksantaj entute 424 paĝojn. Tamen ni komprenas per la termino *esperantologio* pli vastan sciokampon ol oni faris en tiu revuo.

★

Mi esperas ke vi ĝuos dum legado de tiuj tekstoj same kiel mi faris!

Christer Kiselman

Referencoj

- Blanke, Detlev (2006). *Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen*. Redaktita de Sabine Fiedler. Frankfurt am Main: Lang. 405 pp. ISBN 3-631-55024-3.
- KAWASAKI Naokazu (1978, red.). *Prilingvaj Artikoloj de Ossaka. Liaj cirkuleroj interne de la Lingva Komisiono de Japana Esperanto-Instituto*. Manuskripto. Oosaka: Kasiwara Esperanto-Dokumento-Centro. 56 grandformataj fotokopitaj folioj.
- OSSAKA Kenji (1911). Esperantologio. *Oriente Stelo*, organo de Jokosuka Esperantista Societo, jaro 1, no. 1.

A word from the Editor

DEAR READER:

It is a pleasure to present to you the fourth issue of *Esperanto Studies*! It contains five original articles and one review. Of the five articles, four are in Esperanto and one is in English; the review is in Esperanto.

★

On the basis of his extensive experience acquired in the Section for the General Lexicon of the Esperanto Academy, Bertilo Wennergren makes explicit for us his principles for the choice of main entries in dictionaries—they are of course a question of Esperanto lexicology of great importance.

Andreas Künzli has written an encyclopedia on planned languages, in particular about the activity in this area in Switzerland. Gonçalo Neves reviews this monumental work.

The word order subject-verb-object (SVO) is by far more common in Esperanto than the other five possible orders (OSV, OVS, SOV, VOS, VSO). Its frequency is about 90%. In a new study, Christian U. Krägeloh confirms this and discovers a small but significant difference between writers with a Slavic first language and those with a Romance first language.

Natalia Dankova presents an empirical study of verb forms in Esperanto spoken by person having French, Italian, or Russian as their mother tongue, and also discusses verb forms as used by Zamenhof.

Árpád Rátkai makes a detailed study of all the false information concerning Zamenhof that has been spread during a century, and sets the record straight by comparing with facts.

Finally Petr Chrdle reports on a new Esperanto Museum in Svitavy, Czechia, which was inaugurated in 2008.

★

In the first issue of *Esperantologio* / *Esperanto Studies* I quoted an article by Eugen Wüster from 1955, according to which he was the first to use the term *esperantologio* (in 1921). Detlev Blanke draws my attention to the fact that already ten years before that, in 1911, OSSAKA Kenji (1888–1969) published an article with the title “Esperantologio” in the journal *Oriente Stelo* of the Yokosuka Esperanto Society (cited according to Kawaski 1978). See Blanke (2006:167).

★

For the editorial policy of the journal, please see the first issue. The journal is a kind of continuation of the journal *Esperantologio*, which Paul Neergaard (1907–1987) edited and published during the years 1949–1961. Six

issues were published, comprising a total of 424 pages. However, we use the term *esperantologio* ‘Esperanto Studies’ in a wider sense than one did in that journal.

★

I hope you will enjoy reading these articles as much as I did!

Christer Kiselman

References

- Blanke, Detlev (2006). *Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen*. Edited by Sabine Fiedler. Frankfurt am Main: Lang. 405 pp. ISBN 3-631-55024-3.
- KAWASAKI Naokazu (1978, red.). *Prilingvaj Artikoloj de Oosaka. Liaj cirkuleroj interne de la Lingva Komisiono de Japana Esperanto-Instituto*. Manuscript. Oosaka: Kasiwara Esperanto-Dokumento-Centro. 56 photocopied sheets.
- OSSAKA Kenji (1911). *Esperantologio. Orienta Stelo*, Organ of the Yokosuka Esperanto Society, Year 1, No. 1.